

# Strangaj sed veraj faktoj

**JOANNE JOHNS (MELBURNO)**

*Snopes.com estas retejo, kiu kolektas asertojn de sociaj retoj, modernaj legendoj, blagoj kaj folkloro, kontrolas la faktojn, analizas la indikaĵojn, kaj raportas pri la vereco de la asertoj.*

*Jen kelkaj ekzemploj de strangaj sed veraj faktoj, laŭ snopes.com.*

**Moskulo kun vampiraj dentoj estis trovita en Afganujo.**

Ĝi sonas kvazaŭ halovena[1] blago, sed la societo de naturkonservado raportis en 2014, ke esploristaro vidis maloftan kaŝmiran moskulon en nordorienta Afganujo.

La specio, konata pro ĝiaj vampirecaj dentoj, estas preskaŭ malaperinta pro habitata perdo kaj kaŝ-ĉasado. Bedaŭrinde, pro la roka tereno, ili ne kapablis fari foton. La lastan fojon, kiam scienca teamo vidis kaŝmiran moskulon, estis en 1948.



*Simila siberia specio*

[1] neologismo laŭ la angla "Halloween"

**Betty White estis pli aĝa ol tranĉita pano.**

En la tagoj antaŭ la 99a naskiĝdatreveno de (nun forpasinta) aktoro Betty White en 2021, uzanto de Tvitero[2] asertis, ke ŝi estis pli aĝa ol tranĉita pano – kaj pravis.

White naskiĝis la 17an de januaro, 1922. La unua komerca maŝino por tranĉi panon estis kreita ĉirkaŭ 1928 en Iovao, Usono, de Otto Frederick Rohwedder.



*Betty White*

**Urbo en Ohio, Usono, gastigis scenejon en filmo pri elreliĝo de vagonaro transportanta danĝerajn varojn – kaj poste spertis tre similan elreliĝon.**

Ofte snopes.com trovas, ke fotoj de nerilataj eventoj estas disvastigataj post kiam novaj katastrofoj okazas, ekzemple post la lastatempa tertremo en Turkujo, oni ree disvastigis fotojn de aliaj tertremoj kaj ŝajnigis, ke ili estas novaj. Tamen en ĉi tiu kazo, la disvastigata foto veras.

En 2021 multaj enloĝantoj de East Palestine, Ohio, rolis kiel kromrolulоj en la filmo *White Noise* (Blanka Bruo). En la filmo okazas elreliĝo, kiu kaŭzas grandan toksan nubon. Pro tio, la enloĝantoj devas forlasi siajn hejmojn.

La 4an de februaro 2023 okazis vera elreliĝo en la sama urbo, kaj la samaj enloĝantoj, kiuj rolis en la filmo, devis fuĝi de vera toksa nubo.



*Scenejo de elreliĝo en la filmo*



*La vera elreliĝo*

---

[2] neologismo laŭ la angla "Twitter"

**La Baraĵo Tri Gorĝoj en Ĉinujo estas kapabla reteni sufiĉe da akvo por pli malrapidigi la rotacion de la Tero.**

La Baraĵo Tri Gorĝoj kreas la plej grandan hidroelektran baraĵon en la mondo. Levi akvon je pezo de 42 miliardoj da tunoj al 175 metroj super la marnivelo pli malrapidigus la rotacion de la Tero (tre malmulte), kaj kaŭzus pliigon de la longeco de tago je 0,06 mikrosekundoj.

Tamen, por konservi perspektivon, komparu tion al la efikoj de la tertremo kaj cunamo en Indonezio en 2004, kiu malpliigis la longecon de tago je 2,68 mikrosekundoj.




*Baraĵo Tri Gorĝoj*

**Rusaj sciencistoj vekis du 40 000-jaraĝajn vermojn.**

En 2018, rusaj sciencistoj malfrostigis du speciojn de prahistoriaj vermoj (*Panagrolaimus detritophagus* kaj *Plectus parvus*), kiuj estis en ĉiamfrosta grundo dum 32 000 kaj 41 700 jaroj.

Kiam ili ekmoviĝis, la nematodoj estis metitaj en petri-pladojn kaj nutritaj per bakterioj.



*Nematodoj ege pli aĝaj ol tranĉita pano*



*Helen Keller*

**Helen Keller (surdblinda ekde sia infanaĝo) iam flugis aviadilon.**

En 1946, Helen Keller flugigis kvar-motoran aviadilon Douglas Skymaster super Mediteranon dum vojaĝo de Romo ĝis Parizo.

Kvankam la flugo okazis antaŭ preskaŭ 80 jaroj, uzanto de TikTok furoriĝis en 2020 kun la sarkasma aserto, ke Keller estis mensogulo.

Tamen ŝi ja pilotis dum dudek minutoj, sekvante instrukciojn interpretataj per tuŝlingvo.